

ris broge. Kiam Zinjo rememoris Andreon kaj la tutan sian antaŭan vivon, ĉio ŝajnis al ŝi sonĝo. Ŝi vivis ĉe la maro. Ŝi revis pri forraj landoj. Sin amis Andreo. Aŭdaca maristo amis la reĝinon Maud. Sed ĉio ĉi ne estis vero, ĉio estis elpensita. Estis for de reala vivo. La reala vivo estis tio ĉi. Tie ĉi estis varmega stepo, ardigita de la suno, kvazaŭ argila poto. En la stepo mankis akvo. Ĉe mezo de somero plende kliniĝis pitoreskaj suproj de floroj kaj herboj; seka herbo brulvundis krurojn kvazaŭ urtikoj. La homoj vivis en batalfronto. Ili leviĝis kun la unuaj sunradioj kaj okupis siajn lokojn en pezaj maŝinoj. Stepaj ŝipoj krude renversadis ŝtoniĝintan grundon. Gigantaj fosiloj ĉerpis la teron, kaj ĉiu tago antaŭenigis la kavegon de l'estonta kanalo. Tagmeza suno surrampis la alton rekte super la kapo; la radioj torente verŝis la fluojn de fajro. Kaj foje iu, ne elteninte la fajran atakon, kliniĝis ĉe la stirrado. Sunfrapo. Tiam aperis Zinjo. Ŝi agis decide kaj nerapideme. En ŝia sektoro ne okazis gravaj akcidentoj. Ŝi gardis la homojn, kiujn oni konfidis al ŝi. Ŝi estis eta, maldika. La suno plie sekigis kaj hardis ŝin. Solece kaj ŝlosite ŝi portis en la koro sian nekuraceblan doloron, sed ŝi defendis aliajn de la doloro.

Ŝi estis ŝatata.

Tio okazis unu jaron post ŝia alveno. Ŝi memoris, kiel ŝi alvenis. Neniu riproĉis ŝin pro malfruigo. La homoj estis bezonataj, kaj tempo mankis por konversacioj. Oni donis al ŝi la tutan inventaron: ĥalateojn, apoteketon, bastojn kaj similaĵojn, — sidigis ŝin en laŭvojan kamionon kaj sendis ĉi-tien, en stepon. Pluen ĉio pasis ordinare. Vintro iĝis malfacila. Precipe, kiam ekblovis la terura glacia vento. Aperis frostiĝintoj. Ŝi flegis ilin ĝis resaniĝo, kiel patrino. Ŝi mem frostumis la manojn, helpante al ŝoforo, kun kiu ŝi revenis al la sektorejo ripari la kamionon. Estis tridek gradoj, kaj ŝiaj manoj estis tro delikataj. Tion ŝi diris al neniuj. Ŝi faris bandaĵojn, sulkigante la brovojn pro doloro, sed neniuj elsciis pri tio. Al ĉiuj estis malfacile, sed neniuj plendis.

(daŭrigota).

## NOTOJ PRI LA AŬTORO

Zorja estis neordinare dotita homo.

Kiam venas tempo paroli pri ŝi, estas ĉiam malfacile decidi, de kio komenci... Ĉu de tio, ke ŝiaj gepatroj unue renkontiĝis dum Esperanto-kurso, gvidita de E. Aisberg en la

benita urbo en sudo de USSR — Odesso — la nigramara paradizo. Ĉiuj ili estis tiam junaj, esperoplenaj, avidaj je scioj...

Ĉu de tio, ke ŝia koro ĉesis bati ĝuste du tagojn antaŭ la lanĉo de l'unua Soveta sputniko sur orbiton. Ĉar ja nur post tio ŝi emnentiĝis, kiel peoto, verkisto, dramaturgo...

Nur post ŝia morto estis prezentitaj en teatroj du ŝiaj dramoj: « Liberaj majstroj » kaj « Tie, kie ne subiras la suno »; en literaturaj revuoj aperis ŝiaj versaĵoj kaj la novelo « La tero de reĝino Maud ». Sed ŝia trivoluna romano « Sagujo pri virino », same kiel tri aliaj ŝiaj dramoj, kinoscenario kaj multaj versaĵoj ĝis nun ankoraŭ atendas la publikon.

Ŝi naskiĝis la 19-an de septembro 1930, en Odesso.

En infaneco ŝi estis sprita, gaja, impeta knabino. Sed ensagis la kruela milito en la junan vivon. En aĝo de dektri jaroj ŝi, lernante en meza lernejo, samtempe laboris en uzino. Estis necesa ŝia laboro. La tempo estis urĝa.

En 1954 ŝi finis la studojn en Moskva Stata Universitato. Fininte filologian fakultaton — iran fakon, — ŝi forveturis labori en Tadjikistanon. Meza Azio kun ĝiaj sabloj kaj dezertoj, orientaj moroj kaj buntaj vestaĵoj ravis ŝin. Ŝi laboris kiel redaktoro. Tie estis publikitaj en ĵurnaloj ŝiaj unuaj versaĵoj.

La lastan tempon ŝi gvidis vilaĝan klubon apud Moskvo, ŝiaj priskriboj de la 6-a Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj, en kiu ŝi aktive partoprenis kune kun geknaboj de la vilaĝo, estis tiom impresaj, ke ĝis nun konserviĝis kalejdoskopaj pitoresko de viva ĉeno de eventoj kvazaŭ en animigita kolor-gravuraĵo. Ŝiaj eksplicitaj bildoj sentigas la inspiran spiregon de tiuj varmegaj tagoj...

Sensenca kunpuŝiĝo de du aŭtomobiloj, en kiu estis ĉesigita la talenta vivo estis absurda ŝiro de la kreaĵ iniciatoj, kiuj svarmis kaj plaŭdis en la juna, energia, emocia kaj erudicia verkistino.

Tio okazis la 2-an de oktobro 1957. Do baldaŭ jam dek jaroj estos pasintaj de tiu tragedia tago.

Sed ĝis nun imponaj neĝe blankaj krikzantemoj kaj versaĵoj en pleksiglasaj kovriloj, kiujn alportas geamikoj de Zorja por ornami la tombon, ŝajnas iu malica miskompreno...